

La Riverego

Vintro de 2000

Esperanto-Societo Kebekia

N^o 61, Jaro 15^a

47 esperantistoj partoprenis ISE en Okemo

Dum Dank-festa semajnfino, de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro 2000

La septième édition du week-end espérantiste international a réuni 47 samideanoj à la station de ski Okemo, à Ludlow au Vermont, du 7 au 9 octobre 2000. Cette année, c'était au tour de la Société québécoise d'espéranto d'organiser cet événement auquel sont conviés les espérantistes du nord-est de l'Amérique.

El tiuj 47 partoprenantoj, 32 estis usonanoj, 14 kanadanoj kaj unu kolombiano. "Estis granda sukceso", laŭ la prezidanto de ESK, Normand Fleury, kiu multe laboris, kun Zdravka Metz, por finpretigi la programon kaj zorgi la eventon.

La programo estis tri-nivela: kurso por komencantoj, kurso por progresantoj kaj diversaj prelegoj por la lertuloj.

Sabaton, la usona instruisto Bill Maxey prezentis resumon de la lastaj disvolviĝoj koncerne la Lingvon Internacian en Ameriko kaj en la mondo. Kaj dum la novuloj sekvis kursojn, Arnold Victor klarigis al la partoprenantoj la novajn eblecojn uzi Esperanton en la interreto, parolante ĉefe pri Unikodo, nova internacia normo kiu ebligas al la interretuzantoj skribi kaj legi la supersignojn de nia lingvo.

Poste okazis la amikeca vespero, vigligata de Normand Fleury kaj de Amanda Higley, vojaĝemulino kiu vojaĝis tra Eŭropo dum 16 monatoj uzante Esperanton. Kun ludoj uzante muzikon, ŝi ebligis al pluraj esperantistoj malkovri la lastajn muzikajn novaĵojn.

La dimanĉon, post komputilrila prezentado de Enrique Elleberg pri Eeo.8k.com, Thomas Eccardt amuze provokis polemikojn sekvatajn de lertaj kaj viglaj interŝanĝoj, kun kuraĝa temo: "Kapricaĵoj de Esperanto".

David J. Coffin poste prezentis la komputilprogramon kiun li estas preparanta: laŭtleĝilo por Esperanto: ĝi jam funkcias kaj ebligas al uzanto aŭskulti tekston transdonitan al la komputilo. Paul Hopkins, sekretario de la Kanada Esperanto-Asocio, klarigis kiel li faris Esperanton grava parto de sia familio kaj de sia profesio.

Posttagmezon, Amanda Higley rakontis sian vojaĝon tra 16 eŭropaj landoj dum 16 monatoj, kaj ŝi klarigis, ke ŝi volis ekvojaĝi tra Ameriko por prelegi pri sia aventuroj kaj tiel varbi Esperanton.

Post sukcesa oratora konkurso organizita de Zdravka Metz okazis la komuna bufeda vespermanĝo en varma etoso, kaj posta kultura vespero kun

muziko, ludoj kaj prelego de Normand Fleury pri sia partopreno en la lasta Internacia Junulara Kongreso en Honkongo.

Lasttagon, Amanda Higley prelegis pri "Kelkaj priprenoj por la revivigado de Esperanto movado en Nordameriko", kaj Bill Maxey pri "Alia perspektivo por Esperanto en lernejoj".

Jessy LaPointe

Jacques Yvart koncertis esperante

Jacques Yvart, franca mondvojaĝanto, aŭtoro, komponisto kaj kantisto koncertis, la 24^{an} kaj la 25^{an} de novembro, en la *Café à l'Écart* de Longueuil.

Li kantis ĉefe en esperanto sed ankaŭ france laŭ sia lasta kompaktdisko, "Kantojn de Brassens". La esperantaj versioj estis multe ŝatataj de la dudeko da esperantistoj kiuj ĉeestis kaj de la aliaj aŭskultantoj: *Kiam alvenos am' sur ter', Mi revis pri lando sen lando, Ĉiuj floroj estas for, Al Magelanoj de l'universo, Verda benk, La Dizertonto, La tempo de la ĉerizoj*, ktp.

Vintro de 2000, 1

Sur la reto...

“Tri viroj en boato” kiel eLibro

(NUN) - La plej nova titolo en eLibrejo (<http://esperanto.nu/eLibrejo/> aŭ <http://www.esperanto.se/eLibrejo/>) estas “Tri viroj en boato” de Jerome K. Jerome, unu el la klasikuloj de la humura literaturo. Temas pri novtraduko bazita sur la 70-jarojn malnova traduko de G. Badaŝ. La novan tradukon preparis Margaret Munrow (pseŭdonimo), kiu ankaŭ tradukis longan rakonton de D.H. Lawrence (“La virino, kiu forrajdis”), kiu estos havebla en eLibrejo post novjaro 2001. “Tri viroj en boato” ekzistas nur en elektronika formo. Ĉiuj titoloj en eLibrejo estas senpage elŝuteblaj.

Anekdotoj en Esperanto

(NUN) - Se vi ankoraŭ ne scias, do sciui ke vi povas aboni la dissendoliston Anekdotoj en Esperanto, kaj regule ricevi esperantlingvajn vere AMUZAJN ANEKDOTOJN el diversaj mondopartoj. Por aboni nur sendu mesaĝon al esperanto.anekdot-subscribe@listbot.com. Bonvenon ridi!

Lingvodiversiga Eŭropa jaro de lingvoj 2001

(NUN) - Ĉu vi jam scias ke 2001 estas deklarita Eŭropa jaro de lingvoj de Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Unio? En 2001 ankaŭ ni esperantistoj festu lingvan diversecon kaj lingvoinstruadon - kaj ni povas fari tion tutmonde: ekz. per lingvaj festivaloj, broŝuro, partopreno en lingvojaraj eventoj...

L'Année européenne des langues 2001: <http://culture.coe.fr/AEL2001EYL/ael0001.htm>

EŬ-paĝoj (11 lingvoj):

<http://europa.eu.int/comm/education/languages/actions/year2001.html>

Kreskas la politika aŭdaco

(NUN) - La franca deputito Christian Bourquin proponis al la franca ministro respondeca pri la eŭropaj rilatoj, Pierre Moscovici, antaŭenigi la uzon de Esperanto kiel lingvo de Eŭropo. Responde al la deputito Hervé Gaymard, post instigo de la asocio ‘Espervive Savoie’, la ministro de nacia edukado, Jack Lang, respondis (18.08.2000) ke li prenis konon de la levitaj demandoj kun intereso kaj aldonis: “Mi tuj taskas la koncernan

servon pristudi tiun dosieron kun plej granda zorgo kaj ne mankos informi vin pri la sekvoj kiuj estos al ĝi alportitaj”. Tio estas sinteno senprecedenca jam de jardekoj.

TTT-ejo de Hilelista rondo

(NUN) - Hilelista E-rondo lanĉis sian TTT-ejon. Sur regule aktualigata TTT-ejo de Hilelista rondo vi povas trovi ĉiujn ĝisnunajn numerojn de HILELISTO, same kiel ĉiujn aliajn materialojn de la rondo (Deklaracion de hilelisto, projekton de la Statuto de Tutmonda Hilelista Asocio, antaŭinformon pri la 1-a Hilelista renkontiĝo...) Al <http://www.geocities.com/hilelistarondo>.

Kiu volas prizorgi KEJOn?

Se vi havas tempon kaj se vi estas malpli ol 30-jara, ni invitas vin partopreni la revivigon de la Kebekia Esperantista Junulara Organizo. Se neniu respondas antaŭ la fino de februaro, ni malfeliĉe devos disigi KEJOn.

La Riverego (Le Fleuve) est publiĉe par la Societ e qu eb ecois e d'esp eranto en mars, juin, septembre et d ecembre. D ep ots l egaux: Biblioth eq ues nationales du Canada et du Qu eb ec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilit e des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopie    90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Societ e qu eb ecois e d'esp eranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10\$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

 ch eance pour le prochain num ero/Limdato por la venonta eldono: 2001.03.15

R edacteur en chef/Cefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collabor e   ce num ero/Kunlaboris al tiu  i numero Normand Fleury, Zdravka Metz kaj Sylvain Auclair (Korektado). Administrateurs de la SQE/Estraranoj de

ESK: Normand Fleury (pr esident/prezidanto), Sylvain Auclair (vice-pr esident/vicprezidanto), Jessy LaPointe (secr etaire/sekretario), Zdravka Metz (tr esori ere/kasistino), kaj Yvon Roux.

Esperanto-Societo Kebekia/Societ e qu eb ecois e d'esp eranto

6358-A, rue de Bordeaux

Montr eal (Qu eb ec)

H2G2R8

Telefonrespondilo kaj telekopiilo/R epondeur et t el ecopieur: (514) 272-0151

gajulo@hotmail.com

<http://www3.sympatico.ca/esperanto>

Le problème des langues, vu par la presse

*Voici quelques extraits de la
vigile médiatique du militant
Henri Masson:*

La Haye: Inéquité

*"Charlie Hebdo", n° 440, le mercredi 22
novembre, p. 2. Article d'Antonio Fischetti
sur la conférence de La Haye.*

«Ici, l'arme, c'est la langue. Le jargon est non seulement technique, mais, en plus, il est en anglais. Et, hormis dans la salle plénière, rien n'est traduit. Alors, face à une quinzaine d'Américains qui mâchonnent leurs discours en chuchotant des private jokes à leur voisin, comment voulez-vous que le malheureux délégué péruvien s'y retrouve?» C'est ce que prêche en vain Ali Agouli, membre de la délégation marocaine: «La première des choses serait de mettre tout le monde à égalité devant la langue. Les débats se jouent sur des détails très subtils, et seuls les véritables anglophones ont suffisamment de spontanéité pour pouvoir répondre.»

Pourtant ce ne sont pas quelques dizaines de traducteurs qui vont faire exploser le budget de la conférence... «Bien sûr que non. Mais en imposant l'anglais, ils sont sûrs de limiter le nombre d'intervenants dans les réunions.»

Alors, pas étonnant de croiser plus souvent les Sud-Américains au bar du sous-sol - le seul à offrir des jus de fruits frais - que dans les salles de réunions...

Le tout anglais

*Anglais imposé dans les coulisses de
Bruxelles*

*Par Jean Quatremer, Libération, le
vendredi 24 novembre 2000*

Le porte-parole de Chris Patten, le commissaire britannique aux relations extérieures, a lâché le morceau, mardi, lors d'une conférence de presse au cours de laquelle une somptueuse brochure (papier glacé, couleur, photos) sur l'aide aux

Balkans a été distribuée. Comme d'habitude, l'ouvrage était uniquement en anglais. Interrogé sur la raison d'un tel luxe anglophone alors qu'il aurait mieux valu dépenser de l'argent pour traduire l'information dans différentes langues, le porte-parole a répondu: «Mais parce que cette brochure n'est pas seulement destinée aux journalistes mais aussi aux gens ordinaires.»

Bien sûr, des «gens ordinaires» maîtrisant toutes les subtilités de l'anglais... Au-delà de l'anecdote, il y a une politique systématique mise en œuvre par la Commission pour imposer cette langue.

Afrique du Sud

*Extraits d'un article de Rose-Marie
Bruballa de l'AFP:*

L'Afrique du sud, qui célèbre dimanche le jour de l'Héritage, veut mobiliser sa population pour sauver le patrimoine que représentent ses langues originelles, en développer l'enseignement et stopper la «menace» que l'anglais fait peser sur elles.

(...) Langue du commerce, l'anglais a «grignoté» petit à petit différents domaines d'activité, parfois de façon agressive, comme dans certaines sociétés du Cap où il est recommandé de «jeter sans le lire le courrier rédigé dans une autre langue».

(...) «Or la moitié des Sud-africains non-anglophones ne comprennent qu'une faible partie des discours politiques et des communiqués officiels uniquement faits en anglais», a révélé début septembre une chercheuse Lawrence Schlemmer.

Géostratégie

*Dans un article paru dans «Valeurs
actuelles» (22 septembre), David Victoroff
parle d'un colloque qui s'est tenu au Sénat
sur le thème «Géostratégie du brevet et
champ de bataille européen».*

«Le rapport de force n'est pas en notre faveur», laissait tomber, à bout d'arguments, le secrétaire d'État à l'Industrie Christian

Pierret pour défendre un projet d'accord international sur le brevet européen, vivement contesté par une assemblée en colère. (...) En cause, la capacité pour les inventeurs et les entreprises françaises de protéger leurs innovations en Europe et d'accéder à l'information technique et scientifique étrangère en français.

(...) Actuellement, chaque pays adhère à l'Office des brevets européens peut exiger pour garantir cette protection, la traduction du brevet dans sa langue.

Avantage : tous ses nationaux peuvent avoir accès à l'information que contiennent les brevets étrangers sans devoir recourir à des traductions coûteuses. Inconvénient : pour bénéficier d'une protection dans tous les pays européens, l'inventeur ou l'entreprise doit faire traduire ses brevets dans dix-neuf langues avant de les déposer. Un surcoût qui limite considérablement cette possibilité pour les individus isolés ou les petites entreprises sans grands moyens.

Il apparaît ensuite que les États se préoccupent de réduire les coûts de traduction, que la Suisse et la Suède ont proposé que tout brevet déposé en anglais soit valable dans tous les pays adhérents à la convention sur les brevets européens, ce qui est inacceptable pour la France.

La France a donc négocié avec sept autres pays un compromis qui ne rendrait plus la traduction nécessaire si les brevets étaient déposés dans l'une des trois langues officielles de l'Office : anglais, français, allemand. «Une économie substantielle pour les déposants français, et une ruine pour les traducteurs et les conseillers en propriété industrielle qui ont chahuté le ministre.»

(...) Si séduisante soit-elle, cette solution, qui doit encore être ratifiée, n'en pose pas moins un problème de fond : elle aboutira à une majorité de dépôts en anglais ouvrant un boulevard aux innovations américaines et japonaises. De plus, elle rendra juridiquement opposable en France des textes rédigés en anglais et en allemand.

Vintro de 2000, 3

86-a Universala Kongreso de Esperanto Zagrebo, 21-28 de julio 2001

Voici quelques notes concernant le 86^e Congrès universel d'espéranto, qui se déroulera du 21 au 28 juillet 2001 à Zagreb, en Croatie.

Alta Protektanto: La prezidento de Respubliko Kroatio, Stjepan Mesic akceptis esti la Alta Protektanto de la 86-a UK, enirante tiel la riĉan liston de ŝtatestroj en tiu funkcio kaj simbolante la vastan subtenon al Esperanto en Kroatio.

Poŝtmarko: La kroata poŝto omaĝos la 86-an UK per porokaza poŝtmarko. Temos pri la unua UK-rilata poŝtmarko de post 1990.

Kongresejoj: Oni kongresos paralele en du lokoj: la eleganta koncertejo "Vatroslav Lisinski" kaj la proksima Elektroteknika Fakultato. Kelkaj programeroj okazos ankaŭ aliloke.

Vizoj: Indas jam nun esplori ĉe la plej proksima kroata ambasado/konsulejo kiuj vizo-kondiĉoj validas por oniaj lando kaj kazo. La kondiĉoj povos rapide ŝanĝiĝi. La aliĝintoj kiuj bezonos vizon, ricevos oficialan invitilon.

Loĝado: Zagrebo abundas je altklasaj hoteloj kun relative moderaj prezoj (40 ĝis 120 EŬR). Studentaj loĝejoj, sufiĉe proksimaj al la kongresejoj kaj kun komforto de 2- kaj 3-stelaj hoteloj, kostos 20 ĝis 40 EŬR. Estos ankaŭ malpli kostaj loĝeblecoj por grupoj kaj gejunuloj (detaloj ĉe la konstanta adreso). Plenaj informoj kun mendiloj troviĝos en la Dua Bulteno (aperota januare 2001).

Ekskursoj: Oni antaŭvidas tri antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn, ĉefe laŭ la rava kroata marbordo: Istrijo kaj

La Riverego, 4

Kvarnero, Meza Adriatiko kun arkipelago Kornati, Suda Adriatiko kun Dubrovnik. Inter la tuttagaj ekskursoj elstaras la famegaj Lagoj de Plitvice, Kumrovec (la naskiĝloko de Tito), la montara Zagorje-regiono kaj la cikonia vilaĝo Ĉikoŝ.

Junulara programo: Interesitoj kaj amasloĝemuloj kontaktu la lokan prizorganton: Irina Barac, Ozaljska 112, H R - 1 0 0 0 0 , Z a g r e b irina.barac@yahoo.com aŭ ibarac@inet.hr; tel. +385-1-363 5564, portebla tel.: +385-98-414168.

Infana Kongreseto: IIK akceptas E-lingvajn infanojn 6-13-jarajn. Ĝis la jarfino validas favoraj kotizoj. Oni bv. kontakti la komisiiton Stefan MacGill

(Bethlen u. 2, HU-2030 Erd, Hungario (stefan.macgill@galamb.net) aŭ peti informilon ĉe la CO.

Aliĝoj: Ĝis la 25-a de oktobro estis 325 aliĝoj el 40 landoj. Kvankam la unua granda aliĝ-ondo venos jarfine, la pintaj landoj verŝajne jam nun distingiĝas. Apud Kroatio (26) temas pri Germanio (33), Japanio (16), Nederlando (15), Francio (14), Brazilo (13), Italio (11) kaj Pollando (10).

Kotizoj: Ĝis la jarfino validas jenaj kotizoj (ĉiuj sumoj en eŭroj): Individua membro de UEA (IM): 120 [landoj de tarifo B: 90]; ne-IM: 150 [112]; junulo/kunulo/handikapito/komitatano: 60 [45]; samaj kategorioj por ne-IM: 90 [67].

Pledo por pluedono de presita "El Popola Ĉinio"

En la oktobra numero de la konata revuo "El Popola Ĉinio" estas anonco pri la ĉesigo de ĝia eldonado en la ĝisnuna papera formo. Estonte la revuo aperos nur en la elektronika reto, kie ĝi estos senpage rigardebla, ĉe <http://www.ĉina.org.cn/world/>.

Ĉar dum 50 jaroj EPĈ fariĝis tre konata kaj ŝatata inter esperantistoj, mi petas ĉiujn abonantojn kaj ŝatantojn de tiu revuo, ke ili bonvolu skribi al la ĉina ambasadejo en sia lando por esprimi sian bedaŭron kaj sian deziron plu ricevi la revuon ankaŭ en la nuna formo.

La letero estu pozitive vortumita, tio estas: ĝi emfazu la altan kvaliton de la revuo, ĝian utilecon por ekkoni Ĉinion

kaj ĉinajn problemojn, kaj la ĝeneralan ŝaton de ĝi fare de la legantoj, ktp.

Fine de la letero oni esprimu la deziron, ke la kompetenta registara instanco reripensu la decidon kaj ebligu pluan aperon de la papera versio de "El Popola Ĉinio".

Mi ankaŭ instigas ĉiujn, kiuj havas tiun eblecon, regule mem legi kaj diskonigi al aliaj la retan version de EPĈ ĉe www.ĉina.org.cn por montri ankaŭ tiel la popularecon de la revuo inter esperantistoj.

Dankon pro via kunlaboro!

Renato Corsetti,
Vicprezidanto de UEA

Vidi la terglobon alimaniere: Voir la Terre autrement

Voici une belle occasion de vérifier votre connaissance de la langue, grâce à ce texte informatif que vous nous proposons en espéranto et en français.

Tri junaj francaj paroj, kiuj aldonis Esperanton al la lingvoj de ili jam konataj, travivas nun neforgeseblan sperton. Du el ili ekiris el la departemento Vendée, unu en majo 1997 el Poiroux por kvarjara ĉirkaŭeŭropa vojaĝo en rulhejmo, la alia en julio 2000 el La Roche-sur-Yon por dujara petvetura vojaĝo ĉirkaŭ la mondo.

Sian kvaran vintron Gudule, Laurent kaj ilia filineto Lola trapasos ŝirmite en Bulgario dank'al Esperanto.

Post akcepto aparte varmkora en Irano, Rachel kaj David estas nun en Pakistano. La "Lions Club" de Multan honoris ilin per kultura programo kaj vespermanĝo. Ĉar la vizo kiun ili ricevis por Pakistano validas nur kvin tagojn, ili estas nun survoje al Hindio kie ili jam havas kontaktojn per Interreto kaj Esperanto. Véronique kaj Boris, ekirintaj septembre 2000 el Fouquières-Lez-Lens, departemento Pas-de-Calais, por unujara vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, estas jam atenditaj en Sudafriko post agrablaj kaj interesaj kontaktoj en Egiptio kaj poste Tanzanio.

Tiu "epidémio de "vojaĝito"" per Esperanto trovas plejparte sian originon en la sperto de alia juna paro, Maryvonne kaj Bruno Robineau, ekirinta en 1985 el la departemento Maine-et-Loire. Ili trakuris la mondon dum ok jaroj kaj tre kontentas pro dumvoja frua eklernado. Ili nuntempe prezentas lumbildajn prelegojn pri tiu sperto ne ofta, sed kiu povus fariĝi tia. Kaj ilia libro "Et leur vie, c'est la terre" aperis ankaŭ en Esperanto-traduko : "Ili vivis sur la tero - Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo"

Pliaj informoj pri tiuj vojaĝantoj aperas ĉe : <http://www.creaweb.fr/a.reto> kaj <http://mondepouce.ctw.net>.

Trois jeunes couples français, qui ont ajouté l'espéranto à leur bagage linguistique, vivent actuellement une expérience inoubliable. Deux d'entre eux sont partis de Vendée, l'un en mai 1997, du Poiroux, pour un tour d'Europe de quatre ans en roulotte, l'autre en juillet 2000, de La Roche-sur-Yon, pour un tour du monde de deux ans en auto-stop. C'est en Bulgarie que Gudule, Laurent et leur fille Lola passeront leur quatrième hiver à l'abri, une fois de plus grâce à l'espéranto.

Après un accueil particulièrement chaleureux en Iran, Rachel et David sont, eux, actuellement au Pakistan. Le Lions Club de Multan leur a fait l'honneur d'un programme culturel et d'un dîner. Comme le visa qu'ils ont reçu pour le Pakistan n'a que cinq jours de validité, ils sont actuellement en route pour l'Inde où ils ont déjà des contacts par Internet et l'espéranto.

Partis de Fouquières-Lez-Lens, Pas-de-Calais, pour un tour du monde d'un an, Véronique et Boris sont déjà attendus en Afrique du Sud après avoir eu des contacts agréables et intéressants en Égypte, puis en Tanzanie.

Cette "épidémie de voyagite" par l'espéranto trouve pour une grande part son origine dans l'expérience d'un autre jeune couple, Maryvonne et Bruno Robineau, partis du Maine-et-Loire en 1985. Ils ont sillonné le monde durant huit ans et se félicitent d'avoir appris l'espéranto dans les premiers temps de leur voyage. Ils présentent aujourd'hui des conférences-diaporamas sur cette expérience peu commune, mais qui pourrait le devenir, et le livre "Et leur vie, c'est la terre" est paru aussi en traduction espéranto : "Ili vivis sur la tero - Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo". Pour plus de précisions : <http://www.creaweb.fr/a.reto> ou <http://mondepouce.ctw.net>.

Henri Masson

JEFO a un besoin urgent de correcteurs!

L'Organisation de la jeunesse espérantiste française (JEFO), qui gère le cours d'espéranto gratuit sur Internet, a récemment communiqué avec la Société québécoise d'espéranto pour demander la collaboration des espérantistes québécois.

C'est que JEFO est débordée de demandes d'internautes québécois qui souhaitent apprendre l'espéranto et que l'équipe de correcteurs français n'est pas en mesure de prendre tous ces "étudiants" en charge. Mais on ne voudrait tout de même pas les refuser!

Voici quelques explications sur le rôle des correcteurs, qui doivent maîtriser l'espéranto et le français. Ils choisissent eux-mêmes le nombre d'étudiants (normalement, deux pour commencer) et ils reçoivent les exercices des étudiants par courrier électronique. Pour effectuer la correction, en cas de doute, ils ont droit au concours d'un expert. Après avoir terminé la correction, ils renvoient le tout aux étudiants par courriel. Contactez Marc Lavertu à kebek@videotron.ca

Vintro de 2000, 5

Le Manifeste 2000: UEA en position mondiale

(UEA) - Au niveau de toutes les organisations non-gouvernementales internationales, UEA se trouve à la 14e place dans la statistique mondiale des collecteurs de signatures pour le Manifeste 2000. Au 10 octobre plus de 60 millions d'hommes et de femmes ont donné leur soutien par leur signature à ce document à l'initiative d'un groupe de Prix Nobel de la Paix dans le cadre de l'Année Internationale de la Culture de la Paix. La moitié des signatures a été rassemblée de L'Université Brahma Kumaris. La Fédération Mondiale des Clubs, des Centres et des Associations UNESCO a atteint également plus d'un million de signatures.

Voici les 20 ONG internationales les plus actives quant à la collecte des signatures.

30 588 855: Université Spirituelle Mondiale Brahma Kumaris

1 101 481: Fédération Mondiale des Clubs, Centres et Associations UNESCO

247 365: Cercle d'Études Guru Gobind Singh

102 168: Jubilenium

90 014: Confédération Mondiale des Enseignants

70 026: Fondation Dhammakaya

66 816: Pax Christi International

35 109: Caritas Internationalis

30 000: Soka Gakkai International

13 399: Conseil Mondial de la Paix

11 622: Peace Boat

9 578: Soroptimist International

9 216: Fondation Appel des Prix Nobel

5 669: Association Universelle d'Espéranto (UEA)

Rakontu viajn vojaĝojn aŭ viajn gastigadojn sur la reto!

Mi nuntempe estas serĉanta tekstojn de personoj, kiuj vojaĝis uzante Esperanton aŭ kiuj gastigis Esperantistojn de aliaj landoj pere de la Pasporta Servo, kadre de la finpretigado de la retpaĝaro de ESK.

Se vi volas rakonti pri viaj aventuroj aŭ kontaktoj kun eksterlandanoj, bonvolu sendi al mi vian tekston, kiu povas esti tiel longa (aŭ mallonga) kiel vi deziras.

Vi povas povas sendi ĝin poŝte al la adreso de ESK aŭ retpoŝte (mi preferas tion), al la adreso gajulo@hotmail.com.

Mi ankaŭ bonvenigas fotojn, poŝtkartojn, ktp. Ili povos aperi surrete apud via tekstoj.

Jessy LaPointe

Daimler Chrysler merger

Pour ceux qui comprennent l'anglais, voici un texte humoristique que nous a fait parvenir Suzanne Bolduc.

Directors at Daimler Benz and Chrysler have announced an agreement to adopt English as the preferred language for communications, rather than German, which was the other possibility. As part of the negotiations, Directors at Chrysler conceded that English spelling had some room for improvement and has accepted a five-year phase in plan.

In the 1st year, "s" will be used instead of the soft "c", and the the hard "c" will be replased with "k". Not only will this klear up konfuzion, but komputers kan have one less letter. There will be grown kompany enthusiasm in the 2nd year when the troublesome "ph" will be replased by "f". This will make words like "fotograf" 20 percent shorter.

In the 3th year, Daimler-Khryslar akseptanse of the new spelling kan be expekted to reach a stage where more komplikated shanges are possible. Daimler-Khryslar will enkourage the removal of double letters, which have always ben a deterent to akurate speling. Also, al wil agre that the horrible mes of silent "e"s in the languag is disgrasful, and they would go. By the 4th year, peopl wil be reseptiv to steps such as replasing "th" by "z" and "w" by "v".

During ze fifz year, ze unesesary "o" kan be droped from vords kontaining "ou", and similar shanges vud of kors be aplid to al ozer kombinations of letters. After zis fifz year, ve vil hav a reli sensibl riten styl. Zer vil be no mor trubls or difikultis and employes vil find it ezi to komunikat vis ech ozer. Ov korse al supliers vil be expekted to svitsh to zis for al busines komunikation vis Daimler-Khryslar.

Projekto Ĉinia Dua Nacia Lingvo, 2NL

(Inter-Reto) - La Projekto 2NL estis aprobata en Pekino-Ĉinio, inter la Ĉina Esperanto Ligo kaj la Prezidanto de la Internacia Akademio de la Sciencoj (RSM) de Meksikio, D-ro Ruben Feldman Gonzalez, kiu prezentis la iniciaton en majo ĉi jare.

CELO: La celo estas ke la Registaro de Ĉinio akceptu Esperanton kiel Duan Nacian Lingvon (2 NL).

Jam aprobata de Ĉinio la agado intensiĝos por akceptigi Esperanton kiel Duan Nacian Lingvon de ĉiuj landoj de la planedo.

1) Aprobigi Esperanton de la Nacia Ĉina Registaro kiel duan nacian lingvon (2NL).

2) La monda esperantistaro kunlaboru diligente, vigle, tuthore kaj tutkore kun tiu prioritata tasko.

3) Analizo de la Esperanto Movado montras disigon de la celoj kaj banaligo de la fundamenta tasko farenda: aprobi Esperanton kiel 2NL en la tuta mondo komencante per Ĉinio.

4) Profunda analizo de la nuna ekonomio, politiko kaj eduko en la tuta mondo montras ege klare ke nur Ĉinio povas tuj aprobi Esperanton kiel 2NL por siaj propraj konvenoj kaj tiuj de la tuta mondo.

Nur post aprobo de Ĉinio, UNO, EŬ kaj aliaj landoj aprobos Esperanto kiel 2NL.

5) Nepras koncentri energion, rimedojn kaj tempon de la nuna monda esperantistaro por Projekto Ĉinio.

6) Ni revenu kune, solidare kaj amikece al la unua plej grava celo de esperantistoj: Aprobigi Esperanton de la Naciaj Registaroj kiel 2NL.

7) Principa aprobo de ĉi tiu Projekto jam okazis en Pekino (majo 2000) inter pekinaj geesperantistoj de El Popola Ĉinio kaj Ĉina Ligo, same kiel kun geesperantistoj de Wu-han kaj Xi-an kune kun la Prezidanto de la Akademio

Internacia de la Sciencoj-RSM-Filio Meksikio (D-ro Ruben Feldman Gonzalez).

Inter aliaj kunsidis Prof. Lauhlum, Prof. Li, Wan-Lu, Yu-Tao, Prof. Xie de la Bejjina Universitato, D-ro Bocheng, Pei-Zhi, Wang Ruixiang, Sepio Wu, Ye Nanxian, Prof. Peng Zheming, Kendra, ktp.

Jen komentario publikata de Ruben Feldman Gonzalez, Prezidanto de AIS-RSM-Meksikio kaj kunfondinto de PasportaServo:

Ekonomie Ĉinio estas unu el la landoj plej kreskemaj en la nuna mondo.

La transiro al la duobla ekonomia sistemo fariĝis pli malrapide en Ĉinio kaj tio donas al Ĉinio grandan flekseblecon kaj jam klare elmontritan stabilecon ekonomian. La ekonomia stabileco de Ĉinio helpis la tutan mondon dum la ĵusa ekonomia krizo de la tuta Azio. Kontraste, la rapida transiro de Rusio al la duobla ekonomia sistemo pruvis esti katastrofa.

Esperanto, kiel dua nacia lingvo de Ĉinio ege influos la stabilecon de la ekonomio en la tuta mondo, post tuja adopto de Esperanto fare de ĉiuj aliaj landoj.

Reinhard Selten (Nobelpremiito pri Ekonomiko) diris en Pekino per Ĉina Radio Internacia-Aŭgusto 1999- ke "la uzo de la angla lingvo internacie certe ne daŭros por ĉiam, ĉar la nombro de homoj kiuj parolas tiun nacian lingvon denaske ne estas tiom granda. La angla havas nune ekonomian signifon sed post 50 jaroj Ĉinio estos inter la plej riĉaj landoj".

Ni aldonu ke la totala kvanto de eksportaĵoj de Ĉinio okupas la 9-an lokon en la mondo kaj forte influas la internacian merkaton. Facilas vidi kial Ĉinio devus esti la unua nacio por adopti Esperanton kiel Dua Nacia Lingvo.

Krome, politike Ĉinio estas iom pli

sendependa de la grandaj potencoj, kiuj unuflanke estas decidintaj gvidi la destinon de la homaro, ne necese kiel avantaĝa maniero por la vivo kaj la bonfarto de la tuta homaro senescepte.

Interne Ĉinio unuigis (kiel neniu alia lando) plurajn (56) etnojn el la plej malsimilaj kulturoj, religioj kaj sesdek lingvoj. Hanoj kunvivas kun mongoloj, hujoj, tibetanoj, ujguroj, mjaŭxoj, jioj, ĝuangoj, koreoj, manĉuroj, hanoj, kazakoj, kirgizoj, uzbekoj, juguroj, tataroj, ktp, ĝis 2300 luobaoj kaj 10000 rusoj.

Nepras fari similan unuigon por la tuta homaro senescepte. -Nur tiel la mondo konos la pacon. Ĉinio alproksimiĝos pli efike al la mondo kaj inverse post sia adopto de Esperanto kiel dua nacia lingvo de Ĉinio (2 NLC)

La Ĉina lingvo prezentas grandajn malfacilaĵojn; tiel prononce kiel skribe. Male, Esperanto igis komunikon inter ni ege facila. Post adopto de Esperanto kiel Dua Nacia Lingvo, fare de la Ĉina Registaro kaj Popolo, ĉiuj aliaj landoj povos sekvi la saman vojon.

En ĉiu lando Esperanto estos akceptata kiel Dua Nacia Lingvo, kiel UNESKO ripete proponis en la ĵusa pasinteco kaj ekde 1956.

Se iu forgesata aŭ ekspluatata lando de Azio, Afriko aŭ Latinameriko prenas hodiaŭ tiun decidon, ĝi estos same forgesata inter tensioj kaj premoj el ĉiu speco.

Ne estas hazarda okazaĵo ke ĉi tiu iniciato naskiĝis en Latinameriko, granda kontinento historie rabata kaj subpremata, ade en la lastaj 500 jaroj. La sukceso de Projekto 2 NLC alportos neantaŭvideblajn rezultojn por la progreso de la tuta homaro senescepte.

Vintro de 2000, 7

Diru... Kio okazos?

Julio 2001: 86-a Universala Kongreso de Esperanto, en Zagrebo (Kroatio)

Julio 2002: 87-a Universala Kongreso de Esperanto, en Fortaleza (Brazilo)

Ni organizas

Vendredo, 26-a de januaro: MEK (19h)

Vendredo, 23-a de februaro: MEK (19h)

Vendredo, 30-a de marto: MEK (19h)

Vendredo, 27-a de aprilo: MEK (19h)

Vendredo, 25-a de majo: MEK (19h)

Vendredo, 29-a de junio: MEK (19h)

MEK: Montreala Esperanto-Klubo

La Esperanto-Societo kebekia proponas al vi renkontiĝojn en la oficejo de la strato De Bordeaux. Dum tiuj vesperoj, vi povas diskuti pri iu ajn temo, nur ĝojigante la uzon de la lingvo. Aktivaĵoj povas ankaŭ esti organizataj, laŭvole. (esperanto@sympatico.ca, 272-0151).

La Société québécoise d'espéranto vous propose des rencontres, dans ses installations de la rue De Bordeaux. Dans le cadre de ces soirées, vous pouvez discuter de n'importe quel sujet, pour le simple plaisir d'utiliser l'espéranto. Des activités peuvent également être organisées, si vous en faites la demande. (esperanto@sympatico.ca, 272-0151).

Radio-Canada a filmé la Zamenhofa Festo!

Une équipe de tournage de Radio-Canada a passé une partie de la soirée de la Zamenhofa Festo du samedi 16 décembre avec les espérantistes présents pour préparer une présentation de quatre minutes sur l'espéranto qui sera diffusée à l'occasion de la première émission de la série *La Tour de Babel*, le vendredi 26 janvier 2001 à 23h, à l'antenne de Radio-Canada.

Les trois membres de l'équipe se sont montrés très impressionnés par la vivacité de cette langue qu'ils croyaient disparue et ils ont fait montre de beaucoup d'enthousiasme. Ne reste plus qu'à attendre la diffusion du reportage!

Nova sekcio: Inter Ni

La estraro de ESK konstatis, ke estas pli kaj pli malfacile renkontigi esperantistojn, ĉar multaj havas rendevuplenajn taglibrojn aŭ loĝas for de la Esperanto-Domo en Montrealo. Ni ankaŭ ricevas multajn demandojn de kebekianoj en la regionoj kiuj volas korespondi aŭ renkonti samideanojn.

Vi povas ankaŭ kontakti nin ĉe la retpoŝtadreso: esperanto@sympatico.ca aŭ voki nin al (514) 272-0151.

Mi volus interrete korespondi kun aliaj kebekianoj. Mi ankaŭ proponas al vi tion ĉi. Eble vi konas? Ĉe la servo ICQ ekzistas 2 grupoj kie homoj povas interkomuniki unu la aliajn. Ankaŭ ni eĉ povas krei grupon nur por ni. Se ni estas multaj. Eble ni povus esti imitotaj de la alilandaj samideanoj. Mi jam estas en unu el du grupoj mia ICQ numero estas 61393922 kaj mia nomo estas ReG.

Mi scias ke aliaj servoj ekzistas ekz. tiu nomata mIrc, eĉ unu kie ni povas parole interkomuniki sed mi ne estas membro. Tio estas nur sugesto povanta esti interesa por aliaj kebekianoj kiuj volas fratigi unu la aliajn. [Serge Cormier, Sherbrooke, sorpos@hotmail.com.]

La Riverego, 8